Proverboj: uzoj kaj interpretoj

Marc Bavant

▶ **To cite this version:**

Marc Bavant. Proverboj: uzoj kaj interpretoj. Esperantologio kaj la Interreto, Aug 2006, Firenze, Italy. pp. 7-30, ISBN 978-92-9017-099-0. hal-00559999

HAL Id: hal-00559999
https://hal.science/hal-00559999v1

Submitted on 26 Jan 2011

HAL is a multi-disciplinary open access archive for the deposit and dissemination of scientific research documents, whether they are published or not. The documents may come from teaching and research institutions in France or abroad, or from public or private research centers.

L'archive ouverte pluridisciplinaire **HAL**, est destinée au dépôt et à la diffusion de documents scientifiques de niveau recherche, publiés ou non, émanant des établissements d'enseignement et de recherche français ou étrangers, des laboratoires publics ou privés.

Proverboj: uzoj kaj interpretoj

Marc BAVANT

1. Enkonduko

La unuan fojon, kiam mi vidis reklamon por la verko *Proverbaro Esperanta* [Z 1974], mi ne kredis la aferon serioza. Kial diable okupiĝi pri proverboj, tiuj ŝimaj frazetoj, ebligantaj argumenti sen argumentoj? Kiel do la racia lingvo Esperanto povis nutri tiajn simptomojn de malracia pensado?

Mi tamen akiris la verkon – plaĉa tipografio, koverto grafike neprofesieca, sed bela –, kaj legis la antaŭparolon de Waringhien, kio kune kun la specifa historio de la verko iom disbatis miajn antaŭjuĝojn. Sed la proverbaro mem, laŭalfabete aranĝita, vekis miksitajn sentojn: certe kelkaj pecoj havis tre belan ritmon, prezentis profundan aŭ humuran instruon, sed multaj aliaj estis surprize malagrablaj, i.a. kiam temis pri komerco kaj virinoj. Cetere la sama ideo ofte aperis sub pluraj preskaŭ identaj formoj kaj multaj proverboj restis al mi tute malklaraj. La fina laŭtema indekso de Rogister vekis eĉ pli da perplekso...

En tiu ĉi eseo ni do komencos per provo pritaksi la verkon [Z 1974], komparante ĝin kun aliaj prezentoj de la sama materialo, kun aliaj proverbaroj, kaj demandante nin pri la ebleco difini la temon de proverbo. Poste ni turnos la atenton al la tradicia uzo de proverboj, al ilia nuntempa malfavora famo, kaj ankaŭ al la necesa kono de la kunteksto por ĝuste „deĉifri" ilian signifon. Sekvos analizo de la formaj kriterioj, laŭ kiuj iu frazo povas esti konsiderata proverbo. Fine ni montros la avantaĝojn de instrucela uzo de proverboj en paroligaj ekzercoj, ilian valoron por ampleksigi la fonajn kulturajn sciojn de la lernantoj, kaj ilian potencialon por frazeologia riĉigo de la lingvo.

> NB: En la eseo ne mankas piednotoj, en kiujn la aŭtoro ŝatas meti diversajn flankajn konsiderojn. Ni konsilas al la leganto resti ĉe la ĉefa teksto dum la unua legado, kaj legi la piednotojn nur ĉe eventuala relego.

2. La proverbaroj

Historio de la *Proverbaro Esperanta*

La hodiaŭ aĉetebla *Proverbaro Esperanta* [Z 1974] havas sufiĉe komplikan historion. Kion Zamenhof fakte verkis, estis Esperanta traduko de la *Kompara frazeologio rusa-pola-franca-germana* de lia patro, nur parte publikigita, per apartaj kajeroj. Ĉi tiu traduko aperis popece en *La Revuo* inter 1909 kaj 1910, kaj poste ĉe la eldonejo *Hachette*, jam libroforme, en 1910 ([Z 1910]). Dua eldono, konjekteble senŝanĝa, okazis en 1925 ([Z 1925]), kaj nun la materialo de ĉi tiu verko estas havebla en la reto kun malgrandaj prezentomodifoj[1]. En tiu reta versio la proverboj estas listigitaj en 1232 numeritaj sekcioj de po kelkaj proverboj, ĉiu sekcio havante apartan „temon". Tuj ĉe legado mirigas, ke apud la proverboj troviĝas ankaŭ alispecaj frazeologiaĵoj, ke fojfoje mankas la tem-indiko, ke la samaj temoj aperas en disaj sekcioj, kaj do ke la sekcioj aspektas tute senorde vicigitaj. Sed ĉe la fino troviĝas indekso de la temoj, laŭalfabete ordigita (por ĉiu temo aperas la listo de la respondaj sekciaj numeroj), kaj indekso de la sekcioj, laŭnumere ordigita (por ĉiu sekcio aperas la responda temo). En tiu ĉi verko troviĝas entute 2948 proverboj, inter kiuj 318 (nia kalkulo) estas ripetoj de alia[2].

La nuna verko [Z 1974] estas alimaniere organizita. Ĝi reprenas la enhavon de [Z 1910], inkluzive de la antaŭparolo, sed ne ĝiajn indeksojn. Estas krome aldonitaj analiza antaŭparolo de Gaston Waringhien, kaj „averto" de Camille Rogister (elp. kamíj roĵisté), kiu prezentas la du novajn, de li verkitajn, laŭtemajn indeksojn: la unua estas ordigita laŭ temoj kaj supertemoj kun resendo al la proverboj, kaj la dua estas alfabeta listo de la temoj kun resendo al la antaŭa indekso. Grava diferenco inter ambaŭ versioj de la *Proverbaro* konsistas en tio, ke en ĉi-lasta la proverboj estas ordigitaj laŭalfabete, kio ebligis forigon de la 318 ekzaktaj ripetoj — tamen la proksimumaj ripetoj restis[3]. Do entute en la nova proverbaro aperas 2630 pecoj laŭalfabete numeritaj. Ĉar la reordigo kaj la sekva renumerado povis aspekti al kelkaj kiel atenco kontraŭ la Zamenhofa verko, la malnovaj numeroj estas konservitaj en aparta kolumno, kaj en la

1 La originan verkon ni ankoraŭ ne povis konsulti por certiĝi, ĉu ĝi plene identas kun la dua eldono. La reta versio diferencas de ([Z 1925]) per malgrandaj detaloj, supozeble enkondukitaj de la aŭtoroj de la retejo Charles Power kaj Jouko Lindstedt.

2 Ekzemple estas ĝis kvar ripetoj de proverbo *okulo ne atentas, dorso eksentas*, respondanta al jenaj temoj: „atento", kaj „malatento" (kvarfoje ripetita temo). Ni konsideris ripeto proverbon ekzakte identan al iu alia, kun ebla escepto de ne tute identa interpunkcio.

3 Krom tio Rogister aldonis la korektitan proverbon *avarulo kaj porko estas bonaj post la morto*, anstataŭ la ŝajne eraran *malavarulo kaj porko estas bonaj post la morto*, kiun li tamen konservis. Li krome kunfandis la du originalajn *for!* kaj *forigu lin!* en unu solan.

proverba listo, kaj en la unua laŭtema indekso.

Pri restintaj ripetoj

Kiel dirite la ekzaktaj ripetoj ne plu aperas, sed restas pluraj proksimumaj. Kiel ekzemplon ni povas citi: *al kokino la ovo lecionojn ne donu* (temo „kompetenteco” laŭ [Z 1910]), kaj *ovo kokinon ne instruas* (temo „konsilo”). Eĉ pli similaj estas *pli kara estas kap' ol ĉapo*, *pli kara estas kapo ol ĉapo*, kaj *pli kara kapo ol ĉapo* (ĉiuj tri en tri malsamaj sekcioj de la originalo, sub la sama temo „siaĵo”!). Fojfoje la variaĵoj estas pli okulfrapaj, kaj ŝajnas praviĝi per malsama temo kaj malsama forma strukturo: *guto malgranda, sed ŝtonon ĝi boras* (temo „malgrando”), *eĉ guto malgranda, konstante frapante, traboras la monton granitan* (temo „konstanteco”), *senĉesa guto eĉ ŝtonon traboras*, kaj *de guto post guto disfalas granito* (ambaŭ por la temo „senĉeseco”).

Malfacilo asigni temojn

Ĉi-lasta ekzemplo levas la demandon pri la taŭgeco de la asignitaj „temoj”: ĉu „senĉeseco” kaj „konstanteco” estas malsamaj temoj? Ĉu ili estas taŭge nomitaj? Evidente ne. La ĝenerala ideo de la tri lastaj proverboj estas precize la sama kaj povas sumiĝi ne al vorto, sed al tuta frazo de la speco „persistemo venkas ĉiun malfacilaĵon”. La unua proverbo tamen ne parolas rekte pri persistemo, sed ĉefe pri la fakto, ke eĉ persono malforta kaj malpotenca povas venki malfacilaĵojn („malforto estas superebla”). Tamen ankaŭ en ĝi la ideo persistemo aperas pro la uzata metaforo de guto, kiu ja povas bori ŝtonon, sed nur per ago persisteme ripetata fare de unu individuo, aŭ, pli trafe, de kolektivo[4].

Eblas do konkludi, ke komunaj al ĉiuj ĉi kvar proverboj estas la temoj: „persistemo venkas ĉiun malfacilaĵon”, „persistemo venkas forton”, „malforto estas superebla”, „kolektiva ago de malfortuloj samvaloras kiel ago de fortulo”, „forto estas venkebla de malforto” k.a., kun ĉiuj eblaj nuancoj, ke la metafora „ŝtono” povas tradukiĝi ne nur al *forto*, sed pli precize al *fizika* aŭ *intelekta forto*, *socia pozicio*, *obstaklo*, *kormalmoleco*, *necedemo*... kaj eĉ al *persistemo* mem, el kio rezultas, ke persistemo povas venki persistemon! Ja tre ĝusta instruo.

Kiel vidite, la asignado de temoj en [Z 1910] estas tre mankohava kaj maloportuna. Kion do diras [Z 1974] pri la ĵus menciitaj kvar proverboj? Denove venas seniluziiĝo! La laŭtema indekso ebligas trovi la proverbojn rilatantajn al unu temo, sed nenio estas farebla en la mala

4 Estas interese ĉi tie rimarki, ke la metaforo donas al la guto kvazaŭ kolektivan personecon. Ja unusola guto certe ne boras ŝtonon, sed plurmiloj eble jes.

direkto, nome por trovi la temojn ligitajn al unu proverbo: jen la *tubero en la afero*. Temas sendube pri la ĉefa manko de tiu ĉi verko. Sendube, la laŭtema klasado de Rogister (711 temoj, 15 supertemoj), kvankam iom konfuza, aspektas pli serioza, ol tiu de la originalo, sed el la unudirekteco de la laŭtema indekso rezultas granda malfacilo por interpreti nekonatajn proverbojn. Aldona malavantaĝo de tiu ĉi unudirekteco estas, ke ĝi entute malfaciligas komprenon de la klasadosistemo, kio do nin spronis konstrui la inversan indekson (detalojn pri tio vidu en la aldono [6]).

Manko de tema interpretado estas aparte ĝena ĉe proverboj baziĝantaj sur metaforo, ja metaforon facile eblas ne kompreni, aŭ miskompreni. Ekzemple, en *ĉiu havas sian vermon*, aspektas al ni evidenta ia aludo al vermo, kiu igas frukton malbona, nemanĝebla. Do *vermo* ŝajnas signifi malbonaĵon, malperfektaĵon, pekon, mankon moralan aŭ fizikan. Aliflanke, la vermo ronĝas la frukton, en kiu ĝi sidas, kaj ĝi povas esti simbolo ankaŭ de io, kio ronĝas onian animon, ekzemple pasio, ambicio, zorgo k.s. Sed se oni turnas sin al [Z 1910], oni tie trovas, ke la koncerna proverbo aperas sub la temo „sufero", kio samtempe malkonfirmas la unuan interpreton, la plej evidentan, kaj nur duone konfirmas la duan, donante al ĝi nuancon de doloro morala aŭ fizika, kiu ne sekvas senpere el la ideo „ronĝata frukto".

Aliaj fontoj de proverboj

La verko *Proverbaro Esperanta* ne estas la sola verko kun proverboj. Kelkaj aŭtoroj pli-malpli serioze okupiĝis pri kreado de proverboj, ĉar tio povas esti konsiderata specifa literatura ĝenro, samnivele kiel hajkoj aŭ aliaj mallongaj poemformoj.

> Marjorie Boulton famas pro siaj malpezaj pecoj, fojfoje delikate humuraj, per kiuj ŝi prisemis i.a. la ĉapitrojn de [Boulton 1993]: *vi ne disponas oron: donu almenaŭ floron*; aŭ *ne donis rigardon, sursidis do kardon*.
>
> Bernard Golden en la sprita artikolo [Golden 1992] alvokas kolekti frazeologiaĵojn kaj krei novajn, ekzemple per modifo de jam ekzistantaj. Sufiĉas preni faman proverbon, konservi ĝian ĝeneralan formon, sed ŝanĝi la kampon... kaj jen tute nova kaj uzpreta proverbo: *kiu pri kretenaĵo silentas, kretenaĵon konsentas*; *ne ĉio estas en ordo malantaŭ la verda pordo*; *ĉiu pugo du sidvangojn posedas*.
>
> En alia artikolo ([Golden 1995]) la sama montras ankaŭ, kiel ilin produkti per simpla inversigo de la termoj: *kie virino ne povas, tien diablon ŝi ŝovas* (anstataŭ *kie diablo ne*

povas, tien virinon li ŝovas); *belecon taksas ne koro, sed okulo*, sed ankaŭ per formaj procedoj aplikitaj al eĉ iom trivialaj eldiraĵoj: *inter stelo kaj ŝtelo estas pli ol unu ĉapelo*; *de Koreio ĝis Ukraini' oni fajfas pri l' Akademi'* (reference al la pridisputataj Akademiaj decidoj pri landnomoj)!

Male al la antaŭaj, Sabine Fiedler prezentis en [Fiedler 2004] frazeologiaĵojn ne memkreitajn, sed kolektitajn el diversaj fontoj. Inter ili troviĝas kelkaj pecoj, kiuj ne makulus la *Proverbaron Esperantan*: *neniu estas profeto en sia urbeto*; *fali de sitelo en barelon*; *perforti malfermitan pordon*.

Krom tio ekzistas ankaŭ plurlingvaj proverbaroj, kiuj provas doni Esperantajn ekvivalentojn al nacilingvaj proverboj kaj inverse. Aparte interesa estas la verko de Bourgois [Bourgois 1991], en kiu li provizas tradukojn de elektitaj francaj proverboj kaj frazeologiaĵoj, ĉerpitajn por parto el la *Proverbaro Esperanta*, sed ankaŭ memkreitajn: *en mallumo plena, ĉiu estas Helena*; *donu al la lupo iom, ĝi postulos ĉiom*; *kian vi litaĵon faros, tian dormon vi preparos*; *en sia nesto regas ĉiu besto*. Menciinda estas ankaŭ la ankoraŭ nefinita proverbaro Esperanta-portugala kaj portugala-Esperanta [N*].

Aldone, la supre menciita Golden sugestas, ke eblus uzi tradukojn de latinlingvaj klasikaĵoj kiel taŭgan fonton de proverboj. Ni ne scias, ĉu io tia estis efektivigita, sed en la sama klaso de tradukitaj proverbaroj eblus konsideri ankaŭ la biblian libron *Sentencoj de Salomono*, nomatan *Proverboj* en pluraj lingvoj. Fakte, ne temas pri proverbaro en la moderna senco, sed prefere pri moralinstrua litanio, kies ambicia „programo", prezentita en ĝiaj unuaj versoj, celas: instrui saĝon, veron, juston kaj honestecon, doni spriton, singardemon, kapablon gvidi aliulojn kaj kompreni la enigmojn de saĝuloj!... Malgraŭ kelkaj interesaj distikoj, kiel

27:3 Peza estas ŝtono, kaj sablo estas ŝarĝo;
Sed kolero de malsaĝulo estas pli peza ol ambaŭ.

multo en tiu libro ne rivalas kun la koncizeco kaj sukeco de trafa proverbo. Ni citu nur kelkajn el tiuj mornaj instruoj[5]:

10:8 Kiu havas saĝan koron, tiu akceptos moralordonojn;
Sed kiu havas malsaĝan buŝon, tiu renversiĝos.

10:20 La lango de piulo estas plej bonspeca arĝento;

5 Nur post skribo de tiuj kritikaj vortoj mi legis en [Boulton 1993, p. 33], ke nia poetino agnoskante, ke la *Sentencoj* ne taŭgas kiel proverboj, tamen admiras la belecon de la koncerna libro kaj konsideras ĝin alta poezio. Restas al mi nur kliniĝi antaŭ ŝia gusto kaj esperi ĝin iam dividi.

La koro de malpiuloj estas kiel nenio.

Male, la libro *Predikanto* ne prezentas sin kiel poemon, sed multaj el ĝiaj maksimoj frapas la imagon kaj estas pli proksimaj al niaj modernaj proverboj:

1:2	Vantaĵo de vantaĵoj, ĉio estas vantaĵo.
3:1	Por ĉio estas sezono, kaj tempo difinita estas por ĉiu afero sub la suno.
4:6	Pli bona estas plenmano da trankvilanimeco, ol ambaŭmano da penado kaj ventaĵo.
5:10	Kiu amas monon, tiu ne satiĝos per mono.

Prezentomanieroj

Fine de tiu ekskurso tra la proverbaroj ni demandu nin, ĉu la laŭalfabeta ordigo, reganta en [Z 1974], estas la plej taŭga prezentomaniero. Ni jam vidis, ke la laŭtema klasado de [Z 1910] estas maloportuna pro manko de natura ordigo de la temoj. Cetere la sama konstato validas por [Z 1974], se temas pri ordigo de la laŭtema indekso: pro la grupado en supertemoj, la temoj aperas iom ĥaose, sed la aldona laŭalfabeta indekso de la temoj helpas por uzi la unuan indekson.

Pli originalan prezentomanieron elpensis Pejno Simono en sia retejo [Pejno]. Li prezentas la proverbojn laŭ la alfabeta ordo de ĉiu negramatika vorto aperanta en ili. Ekzemple la proverbo *ŝafaro harmonia lupon ne timas* aperos ĉe la vicordoj de *ŝafaro*, *harmonia*, *lupon* kaj *timas*. Pro tio la kvanto da ripetoj estas enorma, sed tiu prezento povas montriĝi utila al kelkaj, por difinitaj uzoj.

Fine ni rimarkigu, ke nuntempe la prezentomaniero malpli gravas, ol kiam necesis presi la proverbarojn: la dosieroj estas haveblaj en komputila formo kaj facile traserĉeblaj kaj indekseblaj. Restas por esperi, ke iu iam trovos taŭgan manieron difini laŭteman klasadon de la proverboj, kaj ke eblos asigni al ĉiu proverbo la responda(j)n temo(j)n.

3. Kial kaj kiel oni uzis proverbojn

Kial proverboj malplaĉas al raciemuloj

La Esperantistoj malbone konas siajn proverbojn, kaj ankaŭ ekster Esperantujo proverboj iom post iom malaperas el la uzado. Almenaŭ tiel okazas en la plej riĉaj landoj. Anna Brennan en sia artikolo [Brennan 1987] rilatigas tion al la fakto, ke proverboj

naskiĝis en civilizo de parola kulturo, kaj tiam havis gravan rolon de transdonebla saĝo, kiun rolon ili nun perdis en nia civilizo de skriba kulturo. La fakto, ke proverboj povas akiri rolon literaturan, kiel substrekas Bernard Golden en sia rebata artikolo [Golden 1988], kaj ankaŭ aliajn uzojn, kiel ni montros ĉi-sube, ne senvalidigas la konstaton de Brennan, ke aliaj rimedoj nun plenumas la antaŭan rolon de proverboj.

La supra konstato estas malĝojiga por la aŭtoro nun, sed antaŭ dudek jaroj li rezonis alie. Li ĉefe vidis en proverboj rimedojn por teni la malklerajn amasojn for de la vero. Kaj efektive, tiel estis: politikistoj ridetante uzis tiajn ŝablonajn frazojn por persvadi la aŭskultanton, ke ili estas homoj pravaj, fidindaj, tute simplaj. Aliflanke proverboj daŭre transportadis sociajn kliŝojn, estis uzeblaj por obstakli ĉion novan kaj prezentis la plej eksmodajn kutimojn kiel devigajn.

Alia kialo kritiki ilin estis, ke en diskutoj, anstataŭ uzi verajn argumentojn, la „popolo" uzis proverbojn por pravigi sian vidpunkton. Tio ne estus tro granda malbono, se proverboj reflektus veron, sed la proverbaj asertoj estas tre ĝeneralaj kaj ne portas en si mem kiun ajn logikan valoron de vero. Plej bona pruvo de tio estas, ke apud difinita proverbo ofte ekzistas alia kun tute alidirekta instruo (komparu ekzemple *bona estas fremdlando, sed aliaj tie loĝu* kun *ĉio transmara estas ĉarma kaj kara*). Surbaze de tio eblas pravigi kion ajn, i.a. ajnan famon (ja *famo ne flugas, se kaŭzo ne estas*, ĉu ne?).

Sendube proverboj, same kiel la pli modernaj reklamaj aŭ politikaj frapfrazoj, plu estas malestimendaj, se uzataj anstataŭ argumentoj. Sed argumentado konsistigas nur malgrandan parton de la komunikaj situacioj. Fakte proverbojn oni kutimis vaste uzi por la simpla celo prezenti sian opinion. Laŭ la tiamaj sociaj kutimoj, necesis fari tion en maniero plej humila, evitante rektan aserton. Eldiri ŝablonaĵon, de ĉiuj konatan, ŝajnigis, ke oni esprimas ion nepersonan, do malpliigis la danĝeron de rebato kaj helpis al la parolanto firmigi la propran memfidon per la simpla fakto, ke li apelaciis al la „popola saĝo".

Cetere proverboj servis ankaŭ por komenti eventon, por iel alkroĉi al ĝi eron da signifo trovitan en la granda katalogo de tutpretaj klarigoj. Ne gravis, ĉu la klarigo estis ĝusta aŭ malĝusta, gravis precipe, ke per tia komento oni havis la impreson regi la eventon kaj montri tion al aliaj homoj.

La situacio, en kiu oni uzas proverbon, influas la signifon

Ĝuste pro ties ŝabloneco unu proverbo povas esti uzata por esprimi multajn malsamajn opiniojn, servi por multaj celoj, do por ilin ĝuste kompreni plej grave estas koni la situacion, en kiu la proverbo estas elparolata.

Ni prenu ekzemplon. Aparte ŝoka por moderna okcidenta konsumanto estas la proverbo *kiu ne mensogas, tiu ne vendas* kaj ĝiaj multnombraj avataroj (*ne taŭgas la vero por komerca afero*; *por vendisto mensogo estas necesa apogo*; *sen mensoga rekomendo ne iros la vendo*; *se vendisto ne mensogas, li aĉetanton ne allogas*...). Oni plej klare vidas, kial tiajn proverbojn povus direkti al vendisto lia mastro aŭ amiko por ordoni, konsili aŭ sugesti mensogon („vi agu laŭ la principo, ke...”). Sed povas uzi ĝin ankaŭ la vendisto mem, kiel sinpravigon antaŭ la malkontenta kliento, rimarkinta la trompon („mi estas devigata agi laŭ la principo, ke...”). Povas uzi ĝin riproĉocele ankaŭ la kliento parolanta al trompanta vendisto („mi rimarkis, ke vi agas laŭ la fia principo, ke...”), aŭ amiko de trompita kliento al ĉi-lasta („kiel vi povas ne rimarki, ke li agis laŭ la principo, ke...”).

Parenteze ni notu, ke riproĉado estas vasta tereno por uzo de proverboj (denove pro tio, ke ŝablona esprimo ebligas vualitan opiniesprimon), kaj ke depende de la situacio la riproĉo kaŝita en proverbo ege varias: riproĉo pri mensogado, pri nesufiĉa mensogado, pri nescio, ke mensogo estas deviga, pri troa kredemo k.t.p.

Surbaze de la antaŭa ekzemplo ni jam vidis kelkajn eblajn uzocelojn: *ordono*, *konsilo*, *sugesto*, *riproĉo*, *sinpravigo*, kaj eblus aldoni: *averto* (en la saman grupon kiel *ordono* kaj *konsilo*), *pardonpeto*, *bedaŭresprimo* (en la saman grupon kiel *sinpravigo*), eĉ *supozo* („mi subflaras, ke la vendisto agis laŭ la principo, ke...”) kaj aliaj. Ni do vidas, ke proverbo estas en si mem multcela kaj neŭtrala – ĝi ne postulas apartan celon de la elparolanto, sed konformiĝas al difinita uzocelo depende de la situacio.

Laste sed ne balaste menciindas, ke la formo de la proverbo kaj la celo de ĝia uzo ne estas kongruaj: ekzemple proverbo kun ordona formo povas esti uzata kiel pardonpeto („mi faris tiel, ĉar oni ordonis al mi, ke...”).

Konkludo

Resume ni diru, ke ne eblas interpreti la celon malantaŭ uzo de proverbo ne konante la situacion, kiu instigis ĝin uzi. Kaj por pli fajna interpretado eĉ ne sufiĉas koni la situacion kaj

scii, kiu parolis, sed necesas ankaŭ interpreti la intonacion kaj aliajn elementojn de nevorta komunikado. Kvankam tio ne estas revolucia eltrovo – ja ekzistas eĉ lingvoscienca branĉo, „pragmatiko[6]", studanta la kuntekstan signifon de eldiroj –, ni insistas, ke proverboj, pli ol aliaj eldiroj, bezonas kuntekstan interpretadon.

4. Kriterioj de la proverba ĝenro

Kiel sciate, ne ĉiu ajn frazo povas soni kiel proverbo. Ni ĉi-sube prezentos kelkajn analizojn pri la kriterioj plenumendaj de proverbo kaj, trovinte ilin nesufiĉaj, ni turnos nin al pli facile regeblaj kriterioj formaj.

Analizo de La Torre

Mauro La Torre listigas en [La Torre 2000] aron da kriterioj difinantaj bonordan proverbon:

Forma fikseco – proverboj estas fiksitaj diraĵoj, en kiuj la vortoj ne estas laŭplaĉe ŝanĝeblaj.

Citeco – proverboj parencas kun citaĵoj. Ne temas pri kriterio rilata al la proverbo mem, sed al ĝia uzado en la fluo de la parolo. Tio reliefiĝas per aparta tipografio, aparta intonacio, aŭ enkondukaj vortoj de la tipo „onidire", „laŭdire" k.s.

Senaŭtoreco – male al la aŭtoraj citaĵoj proverbo ne havas konatan aŭtoron. Oni atribuas ĝin al la „popola saĝo".

Akcepteco – proverboj esprimas ian veraĵon, ĝenerale akceptatan en difinita kultura medio,

Figureco – sed ili ofte uzas metaforon por esprimi ĉi tiun veraĵon.

Koncizeco – proverboj estas treege koncizaj, kutime unu- aŭ du-propoziciaj[7],

Poemeco – kaj ofte prezentas specifaĵojn pri harmonio kaj ritmo, similajn al tiuj uzataj en versfarado.

Unue ni atentigu, ke kvankam oni ofte forgesas distingi inter proverbo kaj frazeologiaĵo (ja

6 La termino estas pli-malpli internacia, kvankam bedaŭrinde misgvida. Kvankam ĝi ne aperas en NPIV, kelkaj ĝin uzas en la reto.

7 Valoras tamen noti, ke la nombro de propozicioj povas esti pli granda ol du: *deziru, ne deziru – ordon' estas, iru!*, aŭ *edzigu filon, kiam vi volas – edzinigu filinon, kiam vi povas* k.a.

nia *Proverbaro* miksas ilin), tamen kelkaj el la supraj kriterioj tute ne aplikiĝas al neproverbaj frazeologiaĵoj – nome *citeco*, ĝia korolario *senaŭtoreco*, kaj *akcepteco* –, aŭ nur parte – nome *forma fikseco* (ja ili kutime konsistas el sintagmo, kiun necesas fleksii konforme al la ludota sintaksa rolo).

Koncerne la kriterion *fikseco* ni permesos al ni ne tute konsenti kun La Torre: efektive ĉiu vorto havas en la proverbo precizan rolon, ofte eĉ plurajn, kaj ŝanĝi unu el ili povas damaĝi la metaforan aŭ poetikan efekton. Sed ni jam montris, ke ekzistas pluraj variaĵoj de kelkaj proverboj, do ke, se estas respektataj iuj kriterioj, proverbo restas rekonebla, eĉ en tute nova vesto. Aliflanke eblas, ene de difinitaj limoj, aliformigi proverbon por adapti ĝin al aparta situacio: se ni volus paroli pri virino tro longe serĉinta la perfektan edzon, ni povus diri *elektadis sen fino, edziniĝis kun porko*, per adapto de la Zamenhofa *elektadis sen fino, edziĝis kun porkino*, aplikebla nur al viroj. Malgraŭ la manko de rimo la modifita proverbo aspektus same „fiksita" kiel la originala. Ni krome memoru la supre menciitan instruon de [Golden 1995], kiu konsilas krei novajn proverbojn per simplaj operacioj super la jam bone establitaj.

Iom flanke de la sama temo, indas konscii, ke pro ilia statuso de „fonaj scioj" aŭ „flugilhavaj vortoj" (vd [Melnikov 1992]) oni ofte referencas al proverboj ne citante ilin tutece, sed per simpla aludo aŭ elipso. Parolante al „tipa Esperantisto", laŭ la terminologio de Melnikov, sufiĉus diri *laŭ la frukto...* por esti komprenata. En la sama kunteksto eblus aludi al la sama proverbo per frazo de la tipo „memoru la proverbajn frukton kaj arbon", aŭ „denove temas pri afero de arbo kaj frukto"... Simile, se en dialogo inter viro kaj virino la virino diras „povas esti, ke mi ne estas virino bonorda, sed mi nepre volas tuŝi tiun ĉi temon", la viro, se li estas tipa Esperantisto, devos kompreni, ke per tia aludo al la fifama *virino bonorda estas surda kaj muta* la kunparolantino ne toleros interrompon, kaj lin anticipe akuzas pri seksismo.

Koncerne la kriterion *akcepteco* ni agnoskas, ke multaj proverboj havas aspekton de nedisputata veraĵo, sed montros ĉi-sube, ke pluraj havas formon alian (ekzemple *krevis la vazo antaŭ la nazo*, aŭ *renkontiĝis la kato kun sentima rato*). Krome valoras rememorigi ĉi tie, ke malgraŭ eventuala aspekto de veraĵo, uzanto de proverbo ne nepre konsentas pri la valideco de tiu veraĵo.

Koncerne la kriterion *figureco* ni konsentas, ke interpreto de proverbo ofte postulas metaforan transporton, sed atentigas, ke multaj proverboj kaj frazeologiaĵoj estas rekte aplikeblaj al iuj

situacioj, aŭ eĉ tute ne ebligas metaforon: *lernu juna, por esti saĝa maljuna*; *malriĉeco ne estas krimo, tamen kondukas al malestimo*; *li estas sia propra mastrino*[8].

Koncerne la kriterion *poemeco* ni atentigos kun La Torre, ke ne temas pri absoluta kriterio – ja kelkaj proverboj estas tute „plataj" de vidpunktoj harmonia kaj ritma: *bedaŭro kaj ĉagreno ŝuldon ne kovras* –, sed ĉiu konsentos, ke la plej efektaj proverboj posedas tiajn ecojn kaj ni detaligos tion en la suba sekcio *Klasifiko laŭ harmoniaj kaj ritmaj specifaĵoj*. Indas ĉi tie memorigi la kutiman teorion, ke harmonio kaj ritmo naskiĝis en literaturo, ĉar en parola kulturo ili helpas memorfiksi la tekston. Nun ni ĝuas ilin sendepende de ilia memorfiksa valoro, sed la poemeco de tre multaj proverboj estas plia indiko pri ilia dekomenca aparteno al la parola literaturo.

Analizo de Fiedler

Sabine Fiedler prezentas en [Fiedler 1999] kaj en la enkonduko de [Fiedler 2004] la kriteriojn, kiujn ŝi opinias specifaj de frazeologiaĵoj (ne nur proverboj):

Plurelementeco – temas pri vortgrupoj aŭ tutaj frazoj.

Figureco – plejofte oni ilin ne komprenu laŭvorte, sed figure[9].

Stabileco – ili formas sufiĉe fiksitajn unuojn.

Uzpreteco[10] – ili estas uzataj kiel nedisigeblaj unuoj.

Esprimpovo – ili havas intensigan funkcion.

Kaj ŝi krome agnoskas la gravecon de *eŭfonio* ĉe multaj el ili.

Estas interese kompari la kriterilistojn de La Torre kaj Fiedler, kvankam ili ne aplikiĝas precize al la samaj objektoj. Ili konsentas pri la kriterio *figureco*. Ŝajnas aldone, ke *uzpreteco* kaj *stabileco* ĉe Fiedler kune respondas al la *forma fikseco* de La Torre.

Plurelementeco ial ne aperas ĉe La Torre, dum fakte ĝi estas por proverbo absolute necesa, ĉar proverboj estas tutaj frazoj kaj malfacilas imagi proverbon el unuvorta frazo. Sed estas

8 La Torre opinias metaforecon deviga por proverboj, kaj vidas ĝin kiel trajton, kiu distingas proverbojn disde aliaj similaj frazeologiaĵoj, kiel maksimoj kaj aforismoj. Ni ĉi tie ne diskutos, ĉu valoras havi apartan difinon por proverbo, sentenco, maksimo, aforismo k.s., sed ni opinias, ke la cititaj kontraŭekzemploj estas sendispute proverboj.

9 La aŭtoro uzas la terminon „idiomeco", kiu ŝajnas al ni malpli klara.

10 Nia termino. La aŭtoro ne donas nomon al ĉi tiu kriterio.

strange, ke Fiedler konsideras ĝin deviga por frazeologiaĵo, ja en ŝia propra koncepto frazeologiaĵoj inkluzivas ankaŭ t.n. „flugilhavajn vortojn” kun specifa kultura signifo, kiel *eterna komencanto* aŭ *fina venko*, al kiuj ni volonte alkalkulus ankaŭ unuelementajn esprimojn, kiel *krokodili*, *kabei*, *verda* k.a.

Esprimpovo ne troviĝas ĉe La Torre, kaj ni povas demandi nin, ĉu ĝi estas kriterio apartiginda de la aliaj. Niaopinie, ne. Efektive, kompare kun nefrazeologia ekvivalento, frazeologiaĵo pli forte impresas, sed tion oni ŝuldas al diversaj faktoroj: uzo de vortoj emociplenaj, aŭ unuavide senrilataj kun la kunteksto de la eldiro (*figureco*), kaj tuja rekonebleco de la esprimo (*ŝabloneco*) kun referenco al iu akceptita valorsistemo (*akcepteco*). Aldone, ĉe proverboj, plej efika intensigilo montriĝas la formaj specifaĵoj fonetikaj (*eŭfonio* aŭ *poemeco*) kaj sintaksaj.

Konklude, ŝajnas al ni klare, ke la supraj kriteriaroj estas interesaj, sed nesufiĉe precizaj kaj ne tute kontentigaj por difini proverbon. Ne provante proponi alternativan kriteriaron, ni tamen studos la proverbojn de la vidpunkto de iliaj formaj specifaĵoj, kio helpu ĉirkaŭskribi la demandon.

Klasifiko laŭ la speco de eldiro

Sendepende de la ilia interpreto la proverboj estas eldiroj, kaj eblas ilin studi laŭ la speco de eldiro. En gramatikaj manlibroj troviĝas jenaj eldirtipoj: *deklara* (aŭ *aserta*), *ordona* kaj *demanda* (al kio kelkaj aldonas la tipon *ekkrian*). Kutime mankas rigora difino de tiuj ĉi tipoj: oni kontentiĝas per indiko, ke la tipoj distingiĝas pli-malpli fidinde per specifaj intonacio, sintakso, morfologio aŭ interpunkcio, ke al la eldiro *deklara* eblas atribui ver-valoron, ke la *ordona* esprimas ordonon kaj la *demanda*... demandon. Se aldoni, ke la uzkunteksto povas signife modifi la intonacion kaj la esprimitan ideon, evidentiĝas, ke la klasifiko ne estas tre firma. Ni tamen provos vidi, kiamaniere eblas fari ion similan specife por proverboj.

Interesa konstato estas la preskaŭ kompleta manko de proverboj kun tipo *demanda*. En la tuta *Proverbaro* troviĝas nur kvar demando-punktoj: *kion fari?*; *kiu ne pekis, kiu ne eraris?*; *per kio la veto?* kaj *pri kio estas la afero?*. El tiuj kvar frazoj nur la dua estas proverbo kaj temas pri retorika demando, t.e. demando, kiu ne povas havi alian signifon ol la aserto „ĉiu iam pekis, ĉiu iam eraris”.

Male, sufiĉe ofta estas la eldiro de tipo *ordona*, kiun oni fojfoje preferus nomi *konsila*: *al*

amiko nova ne fidu sen provo; *drinku tutajn tagojn, sed kontrolu viajn agojn*; *en fremdan vazon ne ŝovu la nazon.* Al tiu tipo apartenas multaj proverboj esprimitaj en volitivo, sed ne ĉiuj (ekzemple *batu malbonulon, li vin flatos — kisu, li vin batos*), kaj ne nur tiuj (ekzemple *al ĉevalo donacita oni buŝon ne esploras*; *pri gustoj oni disputi ne devas*; *memori pri mezuro en laboro kaj plezuro*).

La tro vastan tipon *deklaran* ni preferos disduigi. Unuflanke estas eldiroj *konstataj*. Per ili oni kvazaŭ neŭtrale raportas aŭ komentas ion viditan aŭ vidatan: *en fremda tegmento li flikas truon kaj en propra ne vidas la fluon*; *estas tubero en la afero*; *krevis la vazo antaŭ la nazo; li esploris iom la fundon de la glaso.* La konstato fojfoje montriĝas elipsa koncerne la verbon: *saĝo abunda, sed ne profunda*; *ripetata parolo pri la sama titolo*.

Aliflanke, la deklaro fojfoje akiras pli ĝeneralan validecon – ekzemple pro uzo de ĝeneraliga vorto kiel *ĉiu*, *ĉiam* – kaj aspektas kiel *veraĵo* kun universala valideco: *en sia korto ĉiu kok' estas forta*; *enspezo postulas elspezon*[11]; *ne naskas porko leonidon, nek korniko aglidon*; *donu al krudulo plezuron, li ne scios mezuron*; *propran ĝibon neniu vidas.* Ankaŭ en ĉi tiu kategorio troviĝas senverbaj proverboj: *de sama koloro, de sama valoro*. Al la sama tipo apartenas ankaŭ multaj el la proverboj kun kondiĉa subpropozicio, eventuale ankaŭ implicita: *se en kor' io sidas, vizaĝo perfidas*; *juneco petolis, maljuneco malsatos*; *estas ŝafo, estos lano.*

Plejmulte la proverboj senreziste viciĝas al unu el la tri supraj kategorioj, sed fojfoje eblas ŝanceliĝi.

> Ekzemple la proverbo *dancu diabloj, sed ne en mia arbaro*, povas aspekti kiel ordono al la koncernaj „diabloj" (t.e. diversaj ĝenuloj, malbonkondutuloj aŭ eĉ malbonaj pensoj), sed uzate en situacio de dupersona interparolo, kaj se la alparolato ne estas unu el la diabloj, la frazo malfacile koncepteblas kiel ordono.
>
> Ankaŭ perpleksiga estas *se mi scius, kie mi falos, mi tien metus tapiŝon*: se anstataŭ „mi" troviĝus „oni", ni ne hezitus konsideri ĝin veraĵo, sed la unuapersona pronomo iom kaŝas la ĝeneralecon de la veraĵo kaj inklinigas al interpreto rilata al difinita cirkonstanco. Ni tamen rimarku, ke same kiel ordona formo ne implicas, ke la eldiranto de koncerna proverbo celas ordoni, same la unua persono povas ne rilati al

11 Laŭ ni prefere: **elspezo postulas enspezon* !

la eldiranto mem.

Kondicionalo evidentiĝas *ŝtono de falpuŝiĝo* en nia klasifiko. Ekzemple *se juneco estus sperta, se maljuneco estus lerta!* igas bedaŭri, ke ni ne enkondukis tipon *ekkrian*. Ja male al multaj proverboj, en kiuj la krisigno pleonasme akompanas la ordonon, ĉi tie ĝi indikas veon. Sed la emocio povas esti rilatigata al la nivelo de la supre menciita „pragmatiko", ne al la plej baza nivelo. Fakte ni havas en tiu ĉi proverbo elipson de la ĉefpropozicio, kaj sufiĉas ĝin restarigi, por ricevi veraĵon: „se juneco estus sperta kaj maljuneco lerta, la mondo estus pli agrabla".

Alia ekzemplo de malfacila klasado prezentas *granda telero, malplena kulero*: povus temi pri veraĵo (tro riĉa eksteraĵo ofte seniluziigas), sed ankaŭ pri konstato (kvankam la teleroj estis grandaj, mi restis malsata).

Klasifiko laŭ sintaksaj kriterioj

Facilas rimarki, ke multaj proverboj prezentas nekutiman sintakson. Ni detaligu kelkajn el tiuj apartaĵoj.

Inter la multaj proverboj konsistantaj el pli ol unu propozicio, signifa nombro el ili havas nenian konjunkcion, nek kunordigan, nek subordigan: *lavu tutan jaron, negro ne blankiĝos* (anstataŭ: eĉ se vi lavos lin tutan jaron, negro ne blankiĝos); *la morto ne distingas, ĉiujn egale atingas* (anstataŭ: kaj ĉiujn...); *laboro homon nutras, sen laboro li putras* (anstataŭ: sed sen laboro...); *formanĝis en merkredo, ne serĉu en vendredo* (anstataŭ: ĉar vi formanĝis...) k.s. La du apudmetitaj sendependaj propozicioj havas logikan interrilaton, kiun necesas restarigi en la interpreto, sed ĝi restas kaŝita en la eldiro. Estus interese esplori, ĉu tiu trajto evidentigas pli grandan arĥaikecon de la „popola lingvaĵo" (ja ni scias, ke de historia vidpunkto simpla apudmeto de propozicioj laŭdire antaŭiris kunordigon kaj subordigon), aŭ devenas de ĝia oportuneco por la eldiranto, kiu tiel pli efike vualas sian opinion – unu el la kialoj prefere paroli per proverboj, ol per rektaj opini-esprimoj.

Alia specifaĵo de pluraj proverboj estas manko de verbo. Substantivaj propozicioj estas maloftaj en Esperanto, sed ne en proverboj. Ofte temas pri mankanta kopulo, facila por restarigi: *pli kara* [estas] *kapo ol ĉapo*; *saĝa* [estas, iĝas] *hundo post la vundo*; *ĉiu sezono kun sia bono* (havas sian bonon); sed fojfoje temas pri kompleksaj

frazoj kun pluraj propozicioj implicite subordigitaj: *bonaj kalkuloj, bonaj kunuloj* (kiam la kalkuloj estas bonaj...); *edzin' admirata – edzo malsata*; *farita via faro, nun adiaŭ, mia kara!* (post kiam mi faris vian faron, vi adiaŭas[12]). Ni aldonu, ke en la epoko, kiam estis verkitaj la *Poverbaro*, maloftis uzo de rekta verbigo de adjektivoj kaj substantivoj. Moderna proverbisto eble preferus diri: *bonas kalkuloj, bonas kunuloj*, aŭ *kresko mamutas, sed saĝo liliputas*. Tamen tio ne aplikeblas al ĉiuj kopulmankoj (ekzemple *tablo festena, sed telero malplena* ne povus sen signifoŝanĝo transformiĝi al *tablo festenas, sed telero malplenas*), kaj ankoraŭ mankas patino al tiu stila uzo.

Kiam la verbo ne mankas, oni rimarkas fojfojan mankon de subjekto triapersona. Tio firmigas la aspekton de eldiro *konstata* kaj ŝajnas signifi, ke la frazo komentas la agojn de persono, kies identeco klaras el la elparola situacio: *faras rabon kaj ŝtelon, por oferi al Dio kandelon*; *vivis puninde, mortis ridinde*; *el flamo sin eltiris, en fajron eniris*. Oni povus kredi, ke tiu ĉi procedo servus ankaŭ por formi veraĵojn de la tipo **vivas puninde, mortas ridinde*, sed oni tiel ne diras (tamen eblus: **kiu vivas puninde, tiu mortas ridinde*).

Alia specifaĵo estas pli ol kutima uzo de infinitivo en rolo de propozicia ĉefverbo. Ni tuj diru, ke ni ne alkalkulas al tiu sintaksa specifaĵo la ekzemplojn kiel *vivi kiel kuko en butero*, aŭ *tralavi la gorĝon*: ĉi tie temas pri frazeologiaĵoj, kaj la infinitiva formo montras nur, ke la verbo estas konjugaciebla laŭbezone. Male, en proverboj de la tipo *vivi modere, ne tro interne nek tro ekstere*; *memori pri mezuro en laboro kaj plezuro*; *komenci per flato kaj fini per bato*, la infinitivoj esprimas konsilon, mildan ordonon. Troviĝas eĉ la raraĵo *imiti grandsinjoron – perdi baldaŭ la oron*, en kiu infinitivo ne esprimas konsilon, sed tutsimple konsistigas la kernon de du infinitivaj propozicioj laŭsence ligitaj per neesprimita verbo (*kondukas al*, *signifas*, *implicas*...).

Rimarkiginte la sintaksajn specifaĵojn, ni povas nun provi malkovri kelkajn sintaksajn ŝablonojn, al kiuj konformiĝas la plej efektaj proverboj. Ni intence ne detaligos la tre konatajn

12 La manko de personaj pronomoj malfaciligas la interpreton. La unua interpreto, kiun subtenas la anoncita temo „plenumo" en la originala *Proverbaro*, estus „farinte vian faron/aferon, mi adiaŭas", aŭ „farinte vian faron, *vi* adiaŭas". Sed Rogister per la temo „sendankeco" prilumas la proverbon tute alie, nome kiel riproĉon al iu, kiu senceremonie foriras, post kiam oni plenumis lian deziron, kio supozigas ŝanĝon de la „subjekto" inter la du „propozicioj".

ŝablonojn kun korelativoj (KIA O, TIA O; KIE *, TIE *; KIO *, TIO *), sed prefere turnos la atenton al ŝablonoj nekutimaj en normala lingvaĵo.

O AS, O AS	Ekzemploj: *espero logas, espero mensogas*; *popolo diras, Dio diras*; *homo esperas, morto aperas*; *infano ne krias, patrino ne scias*; *malsaĝulo venas, komercisto festenas* k.s. En tiaj proverboj povas esti ripetata la subjekto, aŭ, pli malofte, la verbo, sed aliokaze sentiĝas forta kontrasto inter respektive la du subjektoj kaj la du verboj. La eldiro havas formon de veraĵo kaj la logika rilato inter ambaŭ propozicioj estas preskaŭ ĉiam implico (se A, tiam B) aŭ koncedo (kvankam A, tamen B). Cetere indas noti la rimiĝon de ambaŭ verboj.
O IS, O AS|IS	Ekzemploj: *mano pekis, dorso pagas*; *tajloro krimis, botisto pendas*; *muso satiĝis, faruno malboniĝis*; *virino eliĝis, kaleŝo senpeziĝis*; *hoko elsaltis, afero haltis*. En tiu ĉi variaĵo la eldiro aspektas kiel konstato, fojfoje komprenebla kiel veraĵo, kaj la logika rilato restas implico aŭ koncedo.
A O, A O	Ekzemploj: *sama gento, sama sento*; *alia urbo, alia moro*; *bonaj kalkuloj, bonaj kunuloj*; *granda nubo, eta pluvo*; *granda telero, malplena kulero*. La du adjektivoj estas aŭ identaj, aŭ en forta semantika kontrasto. La eldiro povas esti konsiderata jen kiel veraĵo, jen kiel konstato, kaj la logika rilato inter ambaŭ propozicioj restas implico aŭ koncedo. Indas noti, ke ofte rimiĝas la substantivoj.
* ITE, * ITE	Ekzemploj: *dirite, farite*; *kiel akirite, tiel perdite*; *kune kaptite, kune punite*; *multe komencite, malmulte plenumite*; *nek pikite, nek hakite*[13]; *ŝerce dirite, cele pensite*. Nenio sintakse malhelpus uzi adjektivan participon anstataŭ la adverban, sed la adverba formo ne toleras subjekton kaj substrekas ĝian mankon. Kiel ĉe aliaj ekzemploj de mankanta subjekto, la eldiro akiras do formon de konstato.

13 La signifo de tiu ĉi proverbo restas al ni obskura. En la originala *Proverbaro* ĝi aperas sub la temo „sentaŭgeco”, eblas do supozi, ke ĝi aplikiĝas al io taŭga por neniu uzo. Iom simile Rogister difinas por ĝi la temon „nedifinebla”. Ĉiuokaze la metaforo malantaŭ *piki* kaj *haki* restas malklara, kaj la participa formo mirigas, ĉar por sentaŭgeco aŭ nedifinebleco oni prefere atendus *nek -ebla, nek -ebla*.

O A, sed O A	Ekzemploj: *kapo majesta, sed cerbo modesta*; *kresko mamuta, sed saĝo liliputa*; *lango miela, sed koro kruela*; *preĝejo proksima, sed Dio malproksima*; *tablo festena, sed telero malplena*; *vesto eluzita, sed pureco spirita*. Ekzistas ankaŭ variaĵoj: *riĉa preparo, sed povo avara* (preferita al *preparo riĉa, sed povo avara* pro la aborta rimo, kiun ĝi ebligas). Denove temas pri eldiroj, kiujn oni nature perceptas kiel konstatojn, sed fojfoje ankaŭ kiel veraĵojn. El la propozicioj mankas kopulo, kion substrekas la vortordo O A (anstataŭ A O), kaj la konjunkcio *sed* ne lasas dubon pri la konceda rilato de la propozicioj. Tiu ĉi ŝablono bone taŭgas por proverboj kun nuanco moka aŭ riproĉa. Cetere indas noti la ĉiaman rimiĝon de ambaŭ adjektivoj.

Kvankam ni tion ne faros en ĉi tiu eseo, estus interese esplori, kiagrade la supre menciitaj sintaksaj apartaĵoj kaj ŝablonoj estas en Esperanto originalaj, aŭ pruntepreniteaj elde nacia lingvo – plej verŝajne la rusa –, kaj kiuj el ili estas troveblaj ankaŭ en aliaj lingvoj de la verko de Marko Zamenhof.

Klasifiko laŭ harmoniaj kaj ritmaj specifaĵoj

Krom sintaksajn, multaj proverboj prezentas ankaŭ poetikajn formajn specifaĵojn. Per tio ni celas, ke ili, kiel poemoj, submetiĝas al apartaj reguloj koncerne harmonion kaj ritmon.

La plej ofta harmonia specifaĵo konsistas en rimo inter diversaj partoj de la proverbo. Tio plej klare vidiĝas en proverboj posedantaj du apartigeblajn „segmentojn”[14]: *vizaĝo sen kulpo,* ‖ *sed koro de vulpo*; *eĉ el sub la tero* ‖ *aperas la vero*. La rimoj estas ofte puraj[15], fojfoje eĉ riĉaj: *ni amu nin frate,* ‖ *sed ni kalkulu akurate*; *amo supermezura* ‖ *ne estas plezura*. Kiel versoj, la segmentoj rimiĝas ĉe la fino, sed fojfoje estas ripetita tuta vorto en alia loko de la segmentoj, kaj ankaŭ tio kreas harmonian efekton: *granda ofico – grandaj zorgoj*; *kiu mizeron ne havis, mizeron ne konas*.

Se temas pri pli-ol-du-segmentaj proverboj vidiĝas kelkaj interesaj fenomenoj. En la

14 Ni ne provos strikte difini la terminon *segmento*, kaj ni agnoskas, ke oni fojfoje povus dividi la proverbojn alimaniere, ol ni faras. Fakte la kialo por decidi pri la limoj de segmento ofte baziĝas sur harmoniaj kriterioj, ekzemple rimo, kio kreas ian diablan cirklon. Tamen, en plimulto de niaj ekzemploj, la segmentoj estas prozodiaj unuoj respondantaj al apartaj propozicioj kaj limataj pere de komo aŭ streko.

15 Pura estas rimo, en kiu identas almenaŭ la *rimbazoj*, t.e. la finaj partoj de ĉiu segmento ekde la lasta akcenta vokalo ĝis la fino. Rimo estas riĉa, se la ripeto ampleksas pli ol la rimbazon. Nepuraj oni nomas rimojn, en kiuj la rimbazo ripetiĝas kun iaj ŝanĝoj.

trisegmentaj plej ofte rimiĝas nur la du lastaj: *vi ne kredas,* ‖ *ne aŭskultu,* ‖ *sed min ne insultu.* Fojfoje la unua segmento tamen rimiĝas nepure: *babilas,* ‖ *muelas,* ‖ *kion lango elpelas.* Sed ekzistas ankaŭ puraj tripecaj rimoj, ĉefe pro ripeto de vorto aŭ simila vortelemento: *atendis,* ‖ *atendis,* ‖ *ĝis lin ĉerko etendis*; *ne bedaŭru hieraŭan,* ‖ *ne atendu morgaŭan,* ‖ *ne forlasu hodiaŭan*; *bovo prenita,* ‖ *koko donita* ‖ *kaj – kvita.* En kvarsegmentaj proverboj povas rimiĝi nur la paraj segmentoj: *batu malbonulon,* ‖ *li vin flatos –* ‖ *kisu,* ‖ *li vin batos*; sed ofte estas du rimoj, aranĝitaj laŭ la klasikaj rimaranĝoj:

kontinua (aabb) – *komercisto* ‖ *estas ĉasisto,* ‖ *li rigardas,* ‖ *kiu sin ne gardas*;

alterna (abab) – *kiu ne akiras,* ‖ *kiam li povas,* ‖ *tiu poste deziras,* ‖ *sed jam ne retrovas*;

Escepte povas aperi eĉ **kruca** rimaranĝo (abba) pro ripeto de vortoj en malsama ordo: *saĝa scias,* ‖ *kion li diras –* ‖ *malsaĝa diras,* ‖ *kion li scias.*

Kiel Waringhien notis en sia antaŭparolo al [Z 1974], la proverboj prezentas ankaŭ rimojn nepurajn, kio estas ĉe ili pli tolerebla ol en poemo. La tuta gamo de tiaj rimoj troviĝas en la *Proverbaro*, sed kelkaj kun tre malmultaj okazaĵoj. Ni do havas

abortajn rimojn (malsama postakcenta vokalo): *langa vundo plej profunda*;

rimoidojn (nur proksimume identaj konsonantoj): *kiom da koroj, tiom da voloj*; *mizero plej ekstreme, Dio plej proksime*;

asonancojn (nur la vokaloj samas): *malsaĝulo, kiel tamburo – kiu pasas, lin batas*;

kaj **agordojn** (nur proksimume identaj vokaloj): *virino bonorda estas muta kaj surda.*

Alispeca harmonia specifaĵo estas aliteracio. Ŝajnas al ni, ke ili ne abundas en proverboj, sed troviĝas kelkaj: *leĝo mallertulon ligas, lertulon fortigas* (l); *bona puno por malbona peno*; kiu lasta aldone prezentas sĥemon de riĉa konsonanta rimo (b-n-p-n ‖ p-r m-l b-n-p-n).

Pri ritmaj specifaĵoj Waringhien ne atentigas, kaj verdire puraj metroj ne tre oftas, sed kiam ili ĉeestas, eĉ se ŝajne hazarde, ili donas apartan patinon al la koncerna proverbo. Ekzemple troviĝas

pluraj **kvartrokeoj**: *pagos lupo por la ŝafo*; *tempo prenas, tempo pagas*; *ĉiu havas sian vermon*; *pelis pavon, falis kavon*; *fino bona, ĉio bona*; *homo pafas, Dio trafas*;

kaj kelkaj majestaj **kvaramfibraĥoj**: *de guto post guto disfalas granito*[16]; *malsato plej bone gustigas la manĝon*.

Konkludo

Ni montris, ke estas malfacile trovi precizajn kriteriojn, kiuj unusignife difinus proverbon aŭ frazeologiaĵon. La kriteriojn de La Torre kaj Fiedler ni volonte reduktus al unu postulo pri *ŝabloneco*: proverbo estas frazo, bone konata de la plimulto (eventuale ĉar speciale lernita), aŭ prezentanta formajn trajtojn, specifajn de tiuj ĉi bone konataj frazoj. Al kio aldonendas, ke preter ĝia banala aspekto de eldiro ordona, konstata aŭ veraĵa, ĝia signifo apenaŭ rilatas kun la pure lingva enhavo, sed estas interpretenda en la kunteksto de la intencoj de la parolanto, post eventuala apliko de metafora transporto kaj sintaksa rekonstruo.

5. Nuntempa valoro de proverboj

Kiel ni ĵus vidis, la proverboj havas formajn specifaĵojn, kiuj igas ilin parencaj kun mallongformaj poemoj. Tio pravigas la jam plurfoje aludita statuso de literatura ĝenro atribuata al ili. Do, senkonsidere, ĉu proverboj plu estas uzataj laŭ sia origina destino, ni povas demandi nin, kian nuntempan uzon ni povas por ili trovi.

Beletro kaj kulturo

Plej normale aspektus ilin uzi en beletro. Kvankam ankoraŭ ne okazis, ke verkisto komponis tute novan proverban kolekton, li tamen povus uzi la jam ekzistantajn frazeologiaĵojn, aŭ krei la proprajn, por enmeti en sian originalan verkon, donante al ĝi patinon de lingvaĵo iom malnova, altastila. Same, se temas pri tradukaĵo, uzo de Esperantaj patinaj esprimoj necesas por ĝuste transdoni la nacilingvajn. Parenca al tiu ĉi rekta beletra uzo de frazeologiaĵoj estas la uzo de „fonaj scioj" pri ili (Vd [Melnikov 1992]) por atingi stilajn efektojn, uzeblajn en ĉiuj sferoj, kie devas regi zorga lingvaĵo, skriba aŭ parola.

Frazeologio

Proverboj estas frazeologiaĵoj, sendube, sed en difinita proverbo estas pli ol unu frazeologiaĵo. Pli precize, en iuj proverboj, troviĝas pluraj agnoskitaj aŭ potencialaj frazeologiaĵoj. Ekzemple jam estas konata la frazeologiaĵo *ŝovi sian nazon* (enmiksiĝi), kiu fontas el la proverbo: *en fremdan vazon ne ŝovu la nazon*.

16 Samritma kiel *eĉ guto malgranda, konstante frapante, traboras la monton granitan*, rekte deveninta el *La Vojo*.

Simile, se ni konsideras la proverbon *birdo kantas laŭ sia beko* (ĉiu agas laŭ la propraj kapabloj kaj limigoj), videblas en ĝi oportuna potenciala frazeologiaĵo *laŭ sia beko* (laŭ la propraj kapabloj), kiel ekzemple en: *mi ne scias, ĉu mi bone sukcesis tiun ĉi taskon, ja mi ĝin faris laŭ mia beko*.

El *al kokino la ovo lecionojn ne donu* (junuloj ne donu lecionojn al maljunuloj) eblas tiri frazeologian uzon de „ovo" kun la signifo aroganta juna nespertulo, aŭ „lecionoj fare de ovo", kiel ekzemple en: *tiu flavbekulo pretendis instrui al mi la laboron, sed mi preteratentis la lecionojn de l' ovo*.

En tio ni vidas tre interesan eblon ampleksigi la Esperantan frazeologion. Tikla demando tamen restas: ĉu manke de forta uztradicio, la koncernaj proverboj estas sufiĉe konataj, por ke tranĉaĵoj el ili estu tuj rekonitaj kaj rilatigeblaj al la tuto? Probable ne, krom por kelkaj el ili. Tia konstato instigas nin do esplori, kiamaniere instrui proverbojn kaj kiujn rolojn ludu proverboj en Esperanto-instruado.

Lingvo-instruado

Ŝajnas nerealisme igi nuntempajn lernantojn parkeri centojn da proverboj, sed prisemi lingvolecionojn per elektitaj proverboj tute eblas. Cetere tio ne estas afero nova. Ekzemple Jean-Luc Tortel en sia aperigota lernolibro [Tortel 2006?], bazita sur la teksto de *La leciono* de Ionesco, uzas proverbojn i.a. por faciligi memorfiksadon de transitiveco de iuj verboj, kaj Boris Kolker amplekse uzas proverbojn en specifaj ekzercoj de [Kolker 2002]. Temas pri ekzerco de la tipoj:

„elektu vorton laŭ via plaĉo", en kiu unu el la vortoj de proverbo estas elektenda en listo de pluraj rimiĝantaj vortoj (ekzemple *afabla vorto pli atingas ol {raporto, komforto, sorto, forto, morto, torto}*);

„finu la frazon", en kiu necesas diveni la finan vorton (ekzemple *amu domon novan kaj amikon...*);

„retrovu la kunulon", en kiu necesas elekti el du kolumnoj la du segmentojn, kiuj formas veran proverbon.

La praktiko montras, ke la lernantoj sufiĉe rapide komprenas la harmoniajn specifaĵojn de proverboj kaj uzas ilin, kiam eblas, por solvi tiajn taskojn. Cetere la ekzercoj estas ŝatataj kaj

montriĝas efikaj por instrui proverbojn kaj iliajn „konstruregulojn”: la lernanto povas eĉ amuziĝi kreante novajn proverbon (*pli atingas torto ol afabla vorto...).

Cetere, ĉar proverboj konsistigas literaturan ĝenron, ni povas ankaŭ proponi al la lernantoj studadon de proverbo, kiel oni studas poemon. Nia sperto montras, ke eĉ timemaj lernantoj ne lasas sin timigi de proverbo kaj sentas deziron esprimi sin pri ĝi. La studo povas konsisti el pluraj partoj.

> Se ni ekzemple prenas la proverbon *granda telero, malplena kulero*, unue oni provu „malvolvi” la sintakson, revortigi la proverbon en pli plata lingvaĵo, rekreante la mankantajn artikulaciajn vortojn: *la telero estas granda, sed la kulero estas malplena*.
>
> Due eblas peti la lernantojn „malvolvi” la metaforojn, provante igi ilin imagi la bazan situacion, en kiu havus sencon elparoli tian frazon (mi estis invitita por manĝi, rimarkis, ke la teleroj estas grandaj, kvazaŭ la manĝo estus abunda, sed mi ne povis satiĝi), kaj ekstrapoli la metaforan signifon (impresa aspekto, sed seniluziiga realigo).
>
> Trie eblas peti la lernantojn elpensi situaciojn, en kiuj ili povus uzi tiun ĉi proverbon, kaj montri al ili, ke la celoj ilin uzi estas diversaj (raporto, riproĉo, klarigo...).
>
> Kaj kvare indas ĉiam peti ilin trovi eventualajn harmoniajn kaj ritmajn specifaĵojn, kio povas servi kiel enkonduko al pli teoria instruo pri rimo kaj metriko.

Entute temas pri tre valora paroliga ekzerco, en kiu la lernantoj volonte partoprenas, sentante sin liberaj ekzerci sian imagpovon.

6. Aldono – Pli pri la indekso de Rogister

La manko de ambaŭdirekteco en la indekso de Rogister instigis nin pli funde esplori la aferon por vidi, ĉu per komputilo eblas rekonstrui la inversan indekson, kaj ĉu ĝi enhavas la valorajn informojn, kiun oni rajtas atendi surbaze de la postparolo de Waringhien en formo de laŭda epitafo al Rogister, forpasinta antaŭ la kompletigo de la verko. Bona novaĵo estas, ke la perkomputila rekonstruo eblas, kaj ke ĝi liveris interesan materialon.

Ekzemple, ĝis nun, nur per hazarda traserĉado ni povis ekscii, ke, en *bojas hundido, ĉar tiel faras la hundo*, aperas la temoj „infanoj” (supertemo „pri kiu”), „imite” (supertemo „kiel”), „hereda karaktero” (supertemo „karakteroj”). Ni vane serĉis, en kiu supertemo povus aperi la

ideo „malico”, kiu ŝajnas ligiĝi al la vorto *boji*. Nun, danke al la inversa indekso, estas klare, ke Rogister ne menciis pliajn temojn por tiu ĉi proverbo.

Agoj-statoj-sentoj

Kiel jam dirite, la proverboj estas klasifikitaj helpe de 711 temoj el inter 15 supertemoj. Ni provu prezenti nian komprenon de la ĉefaj supertemoj. Ĉiu ŝajnas respondi al analizo de la proverboj laŭ difinita akso, difinita kriterio. La unua kriterio temas pri eltrovo de la ĉefaj verbaj ideoj entenataj en la proverbo. En la responda supertemo, nomita „agoj-statoj-sentoj”, troviĝas do ĉefe ag- kaj stat-nomoj kiel ATAKO, BARAKTO, ELREVIĜO, ENVIO, SUFERO k.s.

Kiel, kiam, kie, per kio, por kio, pro kio

Poste venas pluraj supertemoj respondantaj al diversaj cirkonstancoj (t.e. adjektoj) ligitaj kun la menciitaj verbaj ideoj. Ili plej konvene nomiĝas per la demandoj: „kiel”, „kiam”, „kie”, „per kio”, „por kio”, „pro kio”.

> Ekzemple en *rakonti ĉion faritan kaj kaŝitan*, la verba ideo estas KONFESO kaj la kriterio „kiel” alprenas la valorojn SINCERE kaj DETALE. En *riĉulo havas grandan parencaron*, la verba ideo estas PROFITO kaj la kriterioj „por kio” kaj „pro kio” ambaŭ alprenas la valoron MONO, kio ŝajnas kohera. Iom suprize aperas ankaŭ la kriterio „kiel” kun valoro PROFITEME. Sendube la ideo PROFITEMO troviĝas en la proverbo, eĉ pli klare ol PROFITO, sed ĝenas, ke la analizo produktas PROFITI PROFITEME, kie ni prefere atendu PROFITEMO POR PROFITO, aŭ PARAZITI POR PROFITO.

Pri kiu, kia

La du sekvaj kriterioj, „pri kiu” kaj „kia”, ŝajnas rilati respektive al la homa ĉefrolulo de la proverbo kaj al ties kvalitoj. Povas esti, ke ĉi tiu persono rolas kiel subjekto de la koncerna verba ideo, sed la du ideoj ne estas nepre ligitaj.

> Ekzemple por *Romo estas tie, kie estas la papo* ne estas menciita verba ideo, kaj la kriterio „pri kiu” alprenas la valoron ESTRO. En la supre citita *riĉulo havas grandan parencaron*, la kriterio „pri kiu” alprenas la valoron PARENCOJ, kaj „kia” la valoron RIĈA: ne klaras, ĉu la menciitaj parencoj estas tiuj, kiuj profitas, aŭ tiuj, de kiuj oni profitas. Ĉiuokaze la kvalito RIĈA aplikiĝas nur al ĉi-lastaj. Indas rimarki ankaŭ, ke

la proverbo metafore vastiĝas al ĉiaj profitemuloj, eĉ se ne parencaj, kion ne indikas la analizo.

Pli klara estas la analizo de simila proverbo *sako ne sonas – amiko ne konas* (kruda interpreto: vian amikon interesas nur via mono). Denove la kerno de la analizo estas PROFITI PROFITEME POR MONO, sed la kaŭzo estas MIZERO kaj la kriterio „pri kiu” alprenas la valoron AMIKO, kiu bone taŭgas kiel subjekto de la ago PROFITI. Kompare kun la antaŭa proverbo ni krome notas malaperon de la temo RIĈA („kia”), supozeble ĉar la sonanta sako ne implicas konstantan riĉecon de la koncerna amiko.

Alia interesa uz-ekzemplo de la kriterio „kia” estas en *sanktfigurojn ornamas, kaj homojn malamas*: ĉi tie la verba ideo estas ŜAJNO (NEFIDINDA), la maniera adjekto estas HIPOKRITE kaj la kriterio „kia” alprenas la valoron PIA. Same kiel mankas subjekto en la proverbo, mankas kriterio „pri kiu”, ĉar fakte la ĉefrolulo gravas nur pere de sia kvalito PIA. Parenteze, alia maniero atingi la saman rezulton estus difini temon PIULO en la supertemo „pri kiu”, same kiel jam ekzistas ALTRANGULOJ.

Menciinda estas ankaŭ la kurioza analizo de *malbonulon diablo ne prenas*, en kiu aperas nur du temoj: MALBONA („kia”) kaj MALJUSTE („kiel”). Denove mankas verba ideo, denove la ĉefrolulo difiniĝas pere de sia kvalito (kaj rolas kiel objekto en la koncerna frazo), sed la temo MALJUSTE aperas kiel juĝo de eksterulo pri la koncerna „regulo”.

Pri aĵo tia

La sekvaj supertemoj estas pli dornohavaj. La kriterio „pri aĵo tia” ludas la saman rolon, kiel la kriterio „tia”, nome ĝi prezentas distingan econ de la ĉefrolulo, sed nur kiam tiu ĉefrolulo estas aĵo (aŭ besto). La temoj el tiu ĉi supertemo nomiĝas per adjektivoj[17] kiel ABUNDA, KOMPLEKSA, ETERNA k NEETERNA k.s. Estas interese noti, ke al tiu ĉi kriterio ne respondas iu temo „pri kio” por defini la ĉefrolan aĵon substantive, kiu kreus paralelon inter „pri kiu”/„kia” kaj „pri kio”/„pri aĵo tia”.

Ekzemple, en *azenon komunan oni batas plej multe*, aperas la kerno FACILANIME NEDOMAĜI, al kio aldoniĝas la valoro KOMUNA por la kriterio „pri aĵo tia”. Se elvolvi la analizon, ni ricevas: pri ĉio komuna oni facilanime ne domaĝas.

17 Escepto estas la temo NENIO, aperanta nur en du proverboj.

En *ripetata parolo pri la sama titolo*, ĉi tiu kriterio alprenas la valoron MALNOVA kaj ĝi estas la sola temo en la analizo.

Pri abstraktaĵoj

La supertemo „pri abstraktaĵoj” enhavas nur dek tri temojn, nomiĝantajn per abstraktaj substantivoj kiel DEVO, HONESTECO, PACAMO, VIRTO k.s. Pli bona nomo povus esti „moralaj valoroj”. Denove ŝajnas, ke ili servas por difini la ĉefrolulon, kiam temas nek pri persono, nek pri „aĵo tia”, sed ĝuste pri ia valoro. Ekzemple, en *iafoje oni devas okulon fermeti*, la ĉefrolulo estas la valoro TOLEREMO, kiu kombiniĝas al la maniero INDULGE. Niatakse mankas en la analizo la ideo MALOFTECO, sed ĝi ial entute mankas el la listo de temoj. En *akvo kaj pano servas al sano*, la nura temo reliefigita de Rogister estas la valoro SOBRECO.

Travivaĵoj

La supertemo „travivaĵoj” estas pli ampleksa kaj strebas grupi ĉiujn cirkonstancojn de la vivo. Tie troviĝas temoj nomiĝantaj per plej diversaj substantivoj kiel HAZARDO, HEJMO, FELIĈO, LUKSO, SANO, VETERO k.t.p. Ŝajnas, ke oni atribuas al proverbo kriterion el tiu superklaso, kiam la koncerna travivaĵo ĉefrolas. Ekzemple, en *akvo trankvila estas akvo danĝera*, tiu ĉi kriterio alprenas la valoron DANĜERO, sed estas aliaj ĉefroluloj, nome ĉiuj aĵoj perfidaj kaj trankvilaj (kriterio „pri tia aĵo”) kaj la verba ideo ŜAJNO (NEFIDINDA).

Filozofiaj opinioj

La supertemo „filozofiaj opinioj” estas tre magra kun nur kvar temoj: PROVIDENCISMO, OPTIMISMO, PESIMISMO kaj PRAGMATISMO. Kiel ekemplon ni citu *preĝu kore kaj laboru fervore*, kiu arigas la du temojn PRAGMATISMO kaj PROVIDENCISMO, aldone al la verba ideo PREĜO.

Rimarkoj

La supertemo „rimarkoj” estas ankoraŭ pli magra. Ĝi enhavas nur la temon RELATIVECO kaj la enigman KONTRASTOJ KAJ SENKONSEKVENCOJ, troveblan ekzemple en *avarulo avaras, heredantoj malŝparas*.

Aldonaj komentitaj ekzemploj

mi ne povas kapti en ĝi la sencon	agoj-sentoj-statoj: pri tia aĵo:	NEKOMPRENO KLARA k MALKLARA

<table>
<tr><td colspan="3">La ĉefa verba ideo estas NEKOMPRENO kaj ĉefrolas iu MALKLARA aĵo.</td></tr>
<tr><td>ĝi estas por mi Ĥina scienco</td><td>agoj-sentoj-statoj:
kia:
travivaĵoj:
pri tia aĵo:</td><td>NEKOMPRENO
NEKAPABLA
EMBARASO
KLARA k MALKLARA</td></tr>
<tr><td colspan="3">Same kiel supre, sed aldone ĉefrolas NEKAPABLA homo kaj la EMBARASO, kiun li travivas frontante la malklaraĵon.</td></tr>
<tr><td>ĝi helpos kiel hirud' al mortinto</td><td>pri tia aĵo:
kiam:
kiel:</td><td>NETAŬGA
MALFRUE
VANE</td></tr>
<tr><td colspan="3">Ne estas precizigita la ĉefa verba ideo, sed ĉefrolas io NETAŬGA, kio alvenas MALFRUE kaj VANE.</td></tr>
<tr><td>filo konfesis – patro forgesis</td><td>agoj-sentoj-statoj:
agoj-sentoj-statoj:
agoj-sentoj-statoj:
agoj-sentoj-statoj:
pri kiu:
pri kiu:
kiel:
pri abstraktaĵoj:</td><td>PARDONO
PENTO
KONFESO
KULPO
PATRO
FILO
INDULGE
HUMILECO</td></tr>
<tr><td colspan="3">Ĉi-foje la analizo estas tre detala kaj trovas kvar verbajn ideojn kaj du ĉefrolulojn. Al la adjekto INDULGE, rilatigebla kun la verbo PARDONO, povus respondi HUMILE, rilatigebla al KONFESO kaj PENTO, sed ial tiu temo ne ekzistas kiel maniera adjekto. Anstataŭ ĝin ni do trovas la moralan valoron HUMILECO.</td></tr>
</table>

La tuta inversa indekso estas nun en la reto [Rogister 2006].

7. Konkludo

En tiu ĉi eseo ni prezentis la verkon *Proverbaro Esperanta*, montrante kiamaniere ĝi evoluis inter la eldono de 1910 kaj tiu de 1974. Helpe de ĉi-lasta ni konstruis la inverson de la indekso de Rogister kaj eltrovis kelkajn bazajn nociojn pri la maniero ĝin interpreti. Evidentiĝas, ke laŭtema klasifiko de proverboj estas malfacila arto.

Poste ni turnis la atenton al la antaŭjuĝoj kontraŭ proverboj en raciemaj rondoj kaj klarigis la gravecon ilin ne konsideri kiel diskutajn argumentojn aŭ devigajn kondutnormojn, kvankam ili ankaŭ tiel estis uzataj, kaj la neceson ilin „pragmatike" interpreti. Aldone al tiu ĉi distinga kriterio de „pragmatika" interpretebleco ni montris la gravecon de la distinga kriterio *ŝabloneco*, kiu iel mezuras la socian konatecon de la koncerna frazo, aŭ ĝian obeon al formaj kriterioj (ĉefe sintaksaj kaj harmoniaj), ebligantaj ĝin rekoni ŝablona.

Fine ni montris la utilon de proverboj en beletro, frazeologio kaj Esperanto-instruado. Tiu ĉi lasta kampo estas aparte grava, ĉar la proverboj helpas instrui Esperanton, kaj per tia instruo oni ankaŭ instruas la proverbojn, do gravan parton de la kulturaj fonaj scioj necesaj por tipa Esperantisto.

> Temoj por plua esplorado: *originaleco de la sintaksaj specifaĵoj kaj ŝablonoj de la Zamenhofaj proverboj*, *sencohaveco de fajna klasifiko de frazaj frazeologiaĵoj laŭ tradiciaj kategorioj* (proverboj, sentencoj, maksimoj...), *interago inter metafora transporto kaj „pragmatiko”*, *„pragmatika” neŭtraleco de la temoj de Rogister*.

8. Bibliografio

[Boulton 1993] M. Boulton: *Faktoj kaj fantazioj*. 2-a eldono. UEA, Rotterdam, 1993. 432 p.

[Bourgois 1991] L. Bourgois: *Proverbaro Franca-Esperanta* kaj *Esprimoj sankciitaj de l' uzado*. 3-a eldono. SAT-Broŝurservo, 1991. 76 p.

[Brennan 1987] A. Brennan: *Ĉu veraj proverboj povas ekzisti en Esperanto?*. Kontakto, № 105, 1987. 1 p.

[Fiedler 1999] S. Fiedler: *Pri Esperanto-frazeologio*. Esperantologio, Esperantic Studies, Varna, 1999. 3 p. http://www.math.uu.se/esperanto/fiedler.pdf

[Fiedler 2004] S. Fiedler, P. Rak: *Ilustrita frazeologio*. Kava-Pech, Praha, 2004. 136 p.

[Golden 1988] B. Golden: *Originalaj proverboj en Esperanto?*. Kontakto, № 111, 1988.

[Golden 1992] B. Golden: *La kreado de originala frazeologio en esperanto*. Eventoj, № 0015, 1992/10. http://www.eventoj.hu/arkivo/eve-015.htm

[Golden 1995] B. Golden: *Proverboj en Esperanto: hodiaŭ kaj morgaŭ*. La Ondo de Esperanto, № 3-4, 1995. http://esperanto.org/Ondo/L-gold3.htm

[Kolker 2002] B. Kolker: *Vojaĝo en Esperanto-lando*. 2-a eldono. UEA, Rotterdam, 2002. 278 p.

[N*] *Provérbios do Esperanto*. http://www.kocher.pro.br/espero.htm

[La Torre 2000] M. La Torre: *Proverbante oni lernas*. Internacia Pedagogia Revuo, 2000/4. http://www.ilei.info/ipr/proverbante.htm

[Melnikov 1992] A.S. Melnikov: *Specifaj kulturaj scioj de la E-ista kvazaŭetno kaj ilia respeguliĝo en la koncerna lingvaĵo*. Rostov-na-Donu, 1992.

[Pejno] Pejno S. http://ourworld.compuserve.com/homepages/profcon/e_prov.htm

[Rogister 2006] *Proverbaro Esperanta kun indiko de la temoj laŭ la indekso de Camille Rogister*. Perkomputile prilaboris M. Bavant, 2006/4. http://perso.wanadoo.fr/kursoj/studoj/rogister-inversa-indekso.htm

[Tortel 2006?] J.-L. Tortel: *L'espéranto en quarante leçons*. Aperigota.

[Z 1910] L.L. Zamenhof: *Proverbaro Esperanta*, laŭ la verko *Frazeologio rusa-pola-franca-germana* de M.F. Zamenhof. Hachette, Paris, 1910. 82 p.

[Z 1925] L.L. Zamenhof: *Proverbaro Esperanta*, laŭ la verko *Frazeologio rusa-pola-franca-germana* de M.F. Zamenhof. Esperantista Centra Librejo, Paris, 1925. 82 p. http://www.helsinki.fi/~jslindst/proverbaro.html

[Z 1974] L.L. Zamenhof: *Proverbaro Esperanta*. Enkondukoj de G. Waringhien, L.L. Zamenhof, M.F. Zamenhof, C. Rogister. Stafeto, La Laguna, 1974. 168 p.